# *La kuba prezidento partoprenos la mondan pintkunsidon virtualan de IOL*




Havano, jul 8 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel partoprenos ?i-merkrede en la virtuala pintkunsido de la Internacia Organizo de Laboro (IOL), kiu hodia? okazigas  la sesion de mondaj gvidantoj pri la Covid-19 kaj la mondo de laboro, kune kun ?tatestroj, registaraj ?efoj, elstaraj gvidantoj kaj sindikatoj je tutmonda nivelo.

Sub la devizo “Konstrui estontecon de laboro pli bona”, la evento estas platformo altnivela en kiu reprezentantoj de registaroj, labordonantoj kaj laboristoj, kune kun aliaj partneroj povas pritrakti la ekonomikan kaj socian sekvon de la pandemio en ?iu lando kaj regiono.

Unu jaron post celebrado de la centjari?o de la IOL, Kubo kiel membrofondinto prezentos siajn spertojn rilate al labora protekto dum tiu ?i etapo de frontado al la pandemio de la nova kronviruso.

**Radio Habana Cuba**